Horizon-TAAL

maart - april 2018 Jaargang 50 - nummer 290



Portugese dansgroep
op het Zamenhoffeest te Brussel

www.esperanto.be

Met steun van de Vlaamse Gemeenschap

INHOUD

Tweemaandelijks tijdschrift, uitgegeven door de Vlaamse Esperantobond v.z.w.
50ste jaargang - maart - april 2018
Verschijnt de 1ste van elke oneven maand
Overname van artikelen is vrij op voorwaarde dat de bron wordt vermeld en een exemplaar aan de redactie wordt gestuurd

Redactie en administratie: Vlaamse Esperantobond v.z.w. - Lange Beeldekenstraat 169, BE-2060 Antwerpen - tel.: 03 / 234 34 00 - Epost: horizon.taal@esperanto.be
webstek: http://www.esperanto.be/fel/nl

Abonnementen: 30,00 EURO

Rekeningen: t.n.v. Vlaamse Esperantobond, Antwerpen
KBC IBAN BE31 4025 5105 3155, BIC: KREDBEBB
de Post IBAN BE66 0000 2653 3843, BIC: BPOTBEB1

Redactie: Piet Glorieux (piet.glorieux@gmail.com)

Tekstopmaak: Eriko D'Hondt (eriko@telenet.be)

Clubactiviteiten: Katja Lödör (lodorkatja@skynet.be)

Medewerkers: Kevin De Laet , Petro De Smedt, Ivo Durwael, Cyreen Knockaert, Nicky Janssen, Yves Nevelsteen, Kris Panis, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, André Ruysschaert, Mireille Storms, Emiel Van Damme, Lode van de Velde, Ivo Vercammen e.a.

Verantwoordelijke uitgever: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen, Belgio

Advertentietarieven: (alle prijzen zijn in euro)

* Inlassing van 3x dezelfde advertentie van een drukklaar geleverd exemplaar
Btw-tarief van 21% op deze tarieven.

	1-malig	3-malig*	6-malig*
formaat 1/1	257	625	1000
formaat 1/2	150	375	600
formaat 1/3	110	275	440
formaat 1/4	80	200	320
formaat 1/8	55	140	220
formaat 1/12	30	75	120

TEN GELEIDE

Een bekend argument voor Esperanto is dat het (bij Esperanto in grote mate) de “logica” is die bepaalt wat correct of niet correct is, niet zozeer de taalgemeenschap. Bij etnische talen is dat veel minder het geval. Zij zijn mooie oude bomen met veel kronkelende takken, lees: “idiotismen” of ”idioms” (is het toeval dat beide woorden etymologisch verwant zijn?), maar helaas dus veel minder geschikt als universeel communicatiemiddel. Soms zijn de argumenten pro “etnische taal als brugtaal” tegenstrijdig. Mijn leraar Engels bijvoorbeeld probeert zijn cursistenpubliek te stimuleren met het argument dat, als je goed Engels spreekt, zal je bij het (elitaire?) clubje horen van de “echte” sprekers. Anderzijds wil men dat Engels “de” brugtaal is voor iedereen. In de column van Cyreen in dit nummer kan je lezen hoe moeilijk het is voor een niet-Engelstalige om alle finesses van de taal te beheersen. En in een ander stukje uit een docent Engels aan de Technische Universiteit Eindhoven serieuze bedenkingen bij de invoering van Engels als voertaal aan zijn universiteit. Stof tot nadenken…

ESPERANTO STUDIEWEEKEND, 16-18 maart, Bornerbroek (Nederland)
Esperanto leren in je eigen tempo in een mooie omgeving in Nederland
Kom dan naar het ESPERANTO Studieweekend
in Bornerbroek (Midden-Nederland)
Meer info op pg. 4

VLAAMSE ARDENNENDAG, 22 april, Ename (Oudenaarde)
Heb je zin in een natuurwandeling annex cultuurhistorische wandeling in de Vlaamse Ardennen, dan ben je bij ons aan het goeie adres.
Onze voormiddagwandeling gaat door in ’t bos ’t Ename. ’s Namiddags bezoeken we de Archeologische site te Ename, waar je één en ander kunt bijleren over een belangrijk stukje Vlaamse geschiedenis.
Meer inlichtingen bij Piet Glorieux, piet.glorieux@gmail.com
Folder op de website van La Konkordo, https://sites.google.com/site/esperantokortrijk/

PEKO, 9a-13a de majo, Tilff
Ekde 2010, PEKO estas LA Esperanto-renkontiĝo en Belgio: internacia dank’al la partoprenado de multaj Flandroj, Valonoj, Bruselanoj kaj eksterlandanoj, profesie organizita, malfermita al ĉiuj, kaj kun bonegaj manĝoj. Tiel kiel por la antaŭaj PEKOj ni preparas ampleksan kaj mojosan programon:
PEKO 2018 okazos en Tilff , Belgio (apud Lieĝo).
Ekde merkredo la 9a ĝis dimanĉo la 13a de majo.
Informoj kaj aliĝiloj ĉe www.verdajskoltoj.net/peko

BENELUKSA KONGRESO, 14-16 septembro, Houthalen
Jam multe da homoj aliĝis al la Beneluksa Kongreso.
Vidu nian programon en la retejo. Ĉu ankaŭ vin ni povas bonvenigi?
Rapide aliĝu !



Uitnodiging aan de administrantoj van de Vlaamse Esperantobond
ALGEMENE VERGADERING
zaterdag 24 maart 2018 om 13 uur
Esperantohuis, Lange Beeldekensstraat 169 te 2060 Antwerpen

ESPERANTO STUDIEWEEKEND

16, 17 en 18 maart 2018

Er zijn al heel wat aanmeldingen binnen voor het studieweekend op 16 t/m 18 maart 2018. Er zijn nog plaatsen beschikbaar, maar als je zeker wilt zijn dat je kunt deelnemen, wacht dan niet te lang met je aan te melden!

Het programma van dit weekend volgt het vertrouwde patroon. Vrijdagavond komen we aan en is er tijd om oude vrienden te ontmoeten en nieuwe te leren kennen. Niet te laat naar bed, want zaterdag wacht een intensief programma van in totaal vijf lessen, van ’s ochtends tot in de avond. ’s Avonds is er gelegenheid om uit te rusten, te kletsen, spelletjes te doen enzovoort. Soms is er ook nog een korte voorstelling of lezing. Zondag gaan de lessen verder, maar als het weer het toelaat wordt de laatste les vaak vervangen door een gezamenlijke wandeling (uiteraard met begeleiding in het Esperanto!). Het programma is om een uur of drie ’s middags afgelopen.

Er wordt op vier niveaus lesgegeven. Bij de aanmelding geef je je niveau op: absolute beginner, bezig met een beginnerscursus, beginnerscursus net afgerond, gevorderde. Het team van docenten bestaat deze keer uit Fransuaz Pellegrin-Balza, Bert de Wit, Said Baluĉi, Federico Gobbo en Roel Haveman. Allemaal bekende en ervaren Esperantodocenten, dus je bent verzekerd van een uitstekend lesprogramma!

Er komt een groepje uit Vlaanderen en tegelijkertijd verzorgen Yves en Gerd dan een echte boekendienst!

Als cursusgebouw hebben we weer het natuurvriendenhuis Krikkenhaar afgehuurd, in de buurt van Almelo. Dat is ons de vorige keer prima bevallen: een mooie omgeving, voldoende slaapplaatsen, grote gemeenschaps- en lesruimtes, een goed uitgeruste keuken. Tijdens het hele weekend staat de keukenploeg voor ons klaar. Zij zijn maar met zijn tweeën, dus er is wel wat hulp van de deelnemers nodig bij het tafeldekken en opruimen.

Wij zullen alles voorbereiden voor een geslaagde bijeenkomst, maar uiteindelijk zijn het de deelnemers die er echt een succes van maken. Daarom hopen we jullie in groten getale in Krikkenhaar te verwelkomen!

Ineke, Lilian, Arjen-Sjoerd
Studosemajnfino@esperanto-nederland.nl

http://esperanto-nederland.nl/ned/studieweekend.php



POËZIEWEDSTRIJD IN HET FRANS EN ESPERANTO

Poésie en liberté – Poezio Tut'Libera

Deze wedstrijd, gepubliceerd in het officiële tijdschrift van het Franse Onderwijsministerie, wordt sinds 1998 georganiseerd door de vereniging "*Poésie en liberté*" (Poëzie in alle vrijheid).

Tot nu toe kon je alleen deelnemen met gedichten in het Frans. In 2017 namen er vierduizend jongeren uit meer dan twintig landen aan deel. Dankzij de inspanningen van Esperanto-France kan je in 2018, voor de twintigste uitgave, ook deelnemen met een gedicht in het Esperanto.

Jongeren van 15 tot 25 jaar, uit om het even welk land, mogen deelnemen. Het volstaat om een nog niet eerder gepubliceerd gedicht, in versvorm of proza, van maximaal dertig verzen of dertig lijnen, in te zenden. De kandidaten mogen één gedicht in het Frans of in het Esperanto inzenden. Twee gedichten, waarvan een in het Frans en een ander in het Esperanto, kan ook.

Deelnemen kan enkel online van 1 januari tot 7 april 2018, via het formulier op de site www.poesie-en-liberte.fr.

Eind mei duidt de jury de winnaars aan. In november 2018 worden zij uitgenodigd voor een verblijf van drie dagen in Parijs. De esperantisten verblijven in Esperantogezinnen en worden onthaald op een grote eindceremonie. De gedichten zullen ook in boekvorm worden uitgegeven.

Aarzel dus niet om je gedicht in te sturen. Zelfs als je geen prijs wint, is deelname belangrijk. Iedereen krijgt een antwoord.

Contact opnemen of vragen: gilles.tabard@gmail.com
Association Poésie en liberté
Maison des Associations
38, boulevard Henri IV
FR-75004 Paris, France



FRANKRIJK EXPERIMENTEERT MET ESPERANTO

Een beetje verjaard – in de echte zin van het woord – maar toch belangrijk nieuws. In Vlaanderen is er nog een langere weg af te leggen op dit gebied…

Dinsdag 14 februari 2017 werd een delegatie van Esperanto-France ontvangen door de nationale directie van het schoolonderwijs (DGESCO) in Frankrijk.

De ontmoeting was een vervolg op de voorgaande die plaatsvond in september 2016. Deze ontmoeting bood de gelegenheid om die scholen voor te stellen die zich ondertussen hadden opgegeven als pilootscholen voor het onderwijs van Esperanto. Tijdens deze ontmoeting ging men ook in op bepaalde vragen van de DGESCO. Aan de hand van een presentatie werd gewezen op het nut van Esperanto voor de leerlingen (ze de smaak geven van vreemde talen, hen aanmoedigen tot meertaligheid, hun omgaan met anders-zijn bevorderen) en werd een overzicht gegeven van de steunbetuigingen die Esperanto-France kreeg naar aanleiding van het introduceren van Esperanto in de scholen (een positieve waardering door een aantal hoofden van onderwijsinstellingen, getuigenissen van leraren en een voorstel voor een partnerschapsproject tussen Esperanto-France en het ministerie, naar het voorbeeld van wat nu al bestaat voor de Franse bridgefederatie).

DGESCO kreeg een referentiedossier overhandigd waarin diverse aspecten van Esperanto worden aangegeven: de meerwaarde van zijn logische structuur, zijn propedeutische kwaliteiten, de besparingen die het gebruik van Esperanto met zich mee zou brengen (met een verwijzing naar het rapport Grin[1]), de vraag van 70% van de Europeanen om een gemeenschappelijke, neutrale taal te hebben. Het rapport bevatte ook een link naar de online beschikbare informatiebronnen. Alexandre André gaf ook meer details over zijn praktijkervaringen in het lyceum: een club buiten de schooluren, een introductie tot de taal via het "*accompagnement scolaire personalisé*" (een soort 'Centrum voor Leerlingenbegeleiding') aan het tweede middelbaar, een proefexamen dat voorafging aan het baccalaureaat[2] in juni 2016.

De openheid naar de wereld en de mogelijkheid tot uitwisselingen met andere landen interesseerden de administratie in hoge mate. Vanwege de juridische aspecten van het introduceren van een nieuwe taal als extra optie naast de al bestaande – enkel als schriftelijke proef, zoals elke optionele taal – drong de administratie erop aan dat de directeurs die zich opgegeven hadden als pilootschool en de andere die dat ook wensen, contact moeten opnemen met CARDIE (onderzoekscel i.v.m. onderzoek en innovatie in het onderwijs) van het rectoraat van hun school om een lokaal experiment op te zetten, waarbij de nadruk vooral moet liggen op internationale uitwisselingen (corresponderen, gebruik van sociale media, videoconferenties) om aan te tonen dat de taal echt functioneert.

De administratie staat positief ten aanzien van een uitbreiding van de initiatie als de resultaten van de experimenten zouden voldoen, d.w.z. resulteren in een stabiele groep leerlingen en overtuigde leraren.

Een brief van Florence Robin, algemeen directeur van het schoolonderwijs, daterend van 2 april, bevestigt dat het wel degelijk mogelijk is om in de scholen waar Esperanto-onderwijs kan starten, een experiment op te zetten op lokale schaal. Daarbij benadrukt zij wel dat de verspreiding van een taal in het Franse onderwijssysteem aan twee criteria moet voldoen: het bestaan van een stabiele groep leerlingen en de aanwezigheid van personeel met een universitaire pedagogische opleiding. Ze vraagt ook om haar de resultaten van de evaluatie, een jaar nadien, mee te delen.

Alexandre André
(vertaling uit het Frans: Piet Glorieux)

1. Rapport Grin. Op vraag van de Franse 'Haut Conseil De L'évaluation De L'école', stelde de Zwitserse professor economie in 2005 een rapport op over het vreemdetalenonderwijs waarin hij o.a. tot de conclusie komt dat een keuze voor Esperanto een jaarlijkse besparing van 25 miljoen euro zou opleveren.
2. Baccalaureaat. Het examen op het einde van het secundair onderwijs dat toegang geeft tot het hoger onderwijs.

KOMENCIĜIS DUJARA EŬROPA PROJEKTO "MULTLINGVA AKCELILO"


La projekton financas Eŭropa Komisiono pere de sia programo Erasmus+. La projekton gvidas Zagreba eldonejo IZVORI (Fontoj) kaj en Zagrebo kunpartneras ankaŭ la elementa lernejo el Retkovec. Entute en la projekto kunaktivas pliaj 7 partneroj, tri el Slovenio kaj po unu el Slovakio, Germanio, Danio kaj Bulgario. Inter ili estas du universitatoj kaj 3 elementaj lernejoj. La projekto formale startis komence de novembro 2017 kaj devas finiĝi fine de decembro 2019. La realan starton efektive prezentis la unua renkontiĝo de po du reprezentantoj de ĉiuj partneroj kiu okazis de la 10-a ĝis la 11-a de januaro 2018 en Zagreba hotelo Palace. Ĉeestis 18 reprezentantoj de ĉiuj partneroj. La projekto devas produkti lernprogramon por nova volontula lernobjekto por triaklasanoj de bazaj eŭropaj lernejoj (antaŭ enkonduko de dua fremdlingvo – ĉar la unuan fremdlingvon nuntempe, kutime la anglan, oni enkondukas plej ofte jam en la unua klaso).

Per tiu ĉi lernobjekto oni grave plirapidigas la lernadon de dua kaj postaj lingvoj (25-30%). Oni produktos didaktikajn rimedojn por Multlingva akcelilo kiuj uzos maksimume modernan informatikan teknologion. La bazo estos portalo por instruistoj kaj gelernantoj. Kompletan novaĵon prezentos ellaboro de generilo de demandaj frazoj kiujn kreos komputilprogramo kaj ĉiutage demandos la gelernantojn per demandoj konsistantaj nur el vort- kaj gramatikelementoj lernitaj ĝis tiu momento. Tiel krom la du lernohoroj en la lernejo semajne la gelernantoj lernos interaktive ĉiutage ricevante dekon da demandoj al kiuj ili devos skribe respondi. Ili tiel ekzercos la lernitaĵojn por ne forgesi ilin kaj praktikos la lingvon ĉiutage.

La plimulto de la ekzercoj estos ligitaj al la portalo kaj la gelernantoj devos uzi kaj en la lernejo kaj hejme komputilon aŭ tabuletkomputileton. La dua parto de la projekto estos elprovado de tiu didaktika materialo dum 2-monata kurseto kiun en 4 bazaj lernejoj gvidos tieaj fremdlingvo-instruistoj kiuj mem paralele kun la gelernantoj lernos Multlingvan akcelilon. La esenco de tiu enkonduka lernobjekto kiu pli poste akcelos grave la lernadon de dua kaj tria fremdlingvo, sed ankaŭ la komprenon de la propra gepatra lingvo estos parteto de Esperanto kiu estas plej logike gramatike strukturita lingvo. Antaŭe faritaj eksperimentoj pri tiel nomata propedeŭtika rolo de Esperanto montris ke 240 plej oftaj morfemoj de Esperanto kovras 80% de praktika parola lingvo kaj tio estas plej oftaj leksikaj kaj gramatikaj morfemoj de Esperanto.

El ili eblas produkti milojn de uzeblaj kaj tuj praktikataj E-vortoj en ĉiutaga lingvo. Baze de la plej oftaj 500 morfemoj estis farita baza lernolibro de Esperanto laŭ la Zagreba Metodo kies unuan duonon oni ankaŭ uzas en la projekto. Kaj la lasta nekutima celo de la projekto estas ke la Lingvan Akcelilon animacie gvidos instruistoj kiuj ne konas Esperanton, sed faras tion nur baze de instrukcioj en la portalo kaj tiel ne necesos krei apartan instruistaron. La elementa didaktika materialo kaj la du unuaj instrumonatoj okazos jam antaŭ la fino de la lernojaro 2017/2018 do antaŭ la someraj ferioj kaj la partneroj okazigos en septembro la duan partnerrenkontiĝon en Bratislavo kie oni diskutos la spertojn de tiu fazo de la projekto. Post tio la partneroj ellaboros definitivan didaktikan materialon por la tuta unujara lernobjekto el 64 lernohoroj.
Zlatko Tišljar

La unua renkontiĝo de la 9 partneraj organizaĵoj kiu prilaboras la EU-projekton Lingva Akcelilo okazis en Zagrebo de la 10-a ĝis la 11-a de januaro 2018. Temas pri aparte grava projekto, kiel mi sube provos klarigi.
Multlingva Akcelilo estas dujara projekto aprobita fare de EU por plibonigi kaj plirapidigi lingvolernadon ĝenerale. Tiucele ĝi uzas materialon ellaboritan por la Zagreba Metodo por lerni Esperanton. La celo de Multlingva Akcelilo estas prepari instrumaterialojn por plej rapide paroligi la lernantojn. Tiel ĝi uzas severe limigitan kvanton da materialo, kaj forigas ĉiun balaston kiu povus malrapidigi la lernadon.
Sciencaj esploroj de Zlatko Tišljar pri 60.000 surbendigitaj vortoj de parolata Esperanto en 1979 montris
vervolg p. 8



IS HET ENGELS ZO EENVOUDIG?

Op de site "*Viking Blog*" verschenen op 6 februari ll. interessante bedenkingen bij de vermeende kennis van de Nederlanders van hun tweede taal, het Engels. De Nederlanders zijn er namelijk van overtuigd dat ze, na de moedertaalsprekers, als besten ter wereld het Engels beheersen. Men hoeft hier geen ironie of Hollandermop achter te zoeken, want deze opinie blijkt gegrond te zijn, en werd door degelijk onderzoek bevestigd. De vraag is of ze ook altijd goed begrijpen wat een rasechte Brit bedoelt. Er blijken namelijk in het Engels heel wat dagelijks gebruikte uitdrukkingen te bestaan die vaak een andere betekenis hebben dan wat het "gezond verstand" meent te kunnen afleiden.

Om de proef op de som te nemen werd een kleine quiz opgesteld waarbij eenieder die het wenst, kan nagaan of hij/zij de door de Britten courant gebruikte zegswijzen wel degelijk in hun juiste nuance verstaat. Het zijn eenvoudig lijkende uitdrukkingen als "*See you in a bit*", "*he's interesting*", "*not to worry*", … In de quiz wordt gevraagd wat hiermee juist bedoeld wordt, met telkens drie keuzemogelijkheden.

Op basis van een steekproef van 3300 Nederlanders is gebleken dat de gemiddelde deelnemer slechts 62,5% van de punten behaalt, d.w.z. slechts in deze proportie dezelfde betekenis toekent aan de uitdrukkingen als een Brit doorgaans zou doen. Geen "buis" dus, maar eigenlijk is dit resultaat niet zo opperbest voor de besten ter wereld.

De verklaring zou te vinden zijn in de gebondenheid van taalnuances aan de cultuur van de moedertaalsprekers. Bijvoorbeeld de bekende taaljournalist Gaston Dorren stelt dat de Nederlanders doorgaans precies zeggen wat ze bedoelen, ze winden er geen doekjes om. De Britten zouden een stukje heimelijker of beleefder zijn. Er wordt zelfs gesteld dat de Vlaamse cultuur in dit opzicht méér aanleunt bij de Britse. Of wij Zuid-Nederlanders daarom beter scoren in de quiz, is iets anders. Ik heb mezelf ook getest, en mijn resultaat was niet beter of niet slechter dan dit van de gemiddelde Nederlander. Misschien mag ik dus erg fier zijn op mijn kennis van het Engels. Ĉu?

Cyreen Knockaert

vervolg van pagina 7

ke oni povas kompreni 95% de konversacia Esperanto se oni ellernas nur la plej ofte uzatajn 467 morfemojn. Zlatko diplomiĝis ĉe la Universitato de Zagrebo per la prilaborado de tiu materialo por produkti novan lernokurson de Esperanto, kun aliaj kroataj spertuloj pri lingvolernado. Multlingva Akcelilo nun elektis la 242 plej oftajn morfemojn el tiu morfemaro, por esti lernataj fare de bazlernejaj infanoj en lernejoj en Kroatio, Slovenio, Slovakio kaj Bulgario.

La januaran kunsidon ĉeestis instruistinoj el tri landoj, kaj aliaj kunlaborantoj el Germanio, Slovakio, Danio kaj Irlando. La plimulto de la instruistinoj ne parolas Esperanton, sed ili konsentis kunlabori por eltrovi didaktikan aliron al lingvolernado bazita je la Zagreba Metodo por lerni Esperanton. Okazis tre detala diskuto pri la laborprogramo por la venontaj du jaroj.

La partopreno de ne-esperantistoj en la projekto, KVANKAM ĝi iom komplikas la komunikadon, povos helpi eltrovi aliron al lingvolernado kiun povos uzi eĉ instruistoj kiuj ne parolas Esperanton. Kelkaj ecoj de la strukturo de Esperanto igas ĝin aparte taŭga por la plirapidigo de lingvolernado ĝenerale. Ni menciu la fakton ke la morfemoj de Esperanto estas neŝanĝeblaj kaj libere kombineblaj, kaj ankaŭ la fakto ke tiuj morfemoj uzeblas kiel sendependaj vortoj, kiel en la ĉina lingvo. Neniu HINDEŬROPA lingvo havas tiujn trajtojn, kaj aparte gravas ke lingvoinstruistoj tra la EU-landaro eksciu tion.

Lingvolernado en EU estas en krizo: ekde la Eŭropa Konsilio de Barcelono de 2002 la oficiala celo de EU estas ke ĉiu EU-civitano lernu almenaŭ tri lingvojn – la denaskan kaj du aliajn. Pli kaj pli klaras ke la dominado de la angla en instrusistemoj rekte malhelpas la EU-celon, ĉar ĝi prenas troan lernotempon kaj samtempe malpliigas la motivadon lerni trian lingvon. Surveylang, organizita fare de la Eŭropa Komisiono en 2012, science montris tiun fakton, kaj la mankon de sukcesa lingvolernado. Ekzemple, Surveylang eĉ ne ekzamenis homojn je la 2 superaj niveloj, C1 kaj C2. Mi demandis kial, kaj la respondo estis – ĉar la kvanto da lermantoj kiuj atingis la C1-nivelon en la unua fremdlingvo – ni lasu sen mencio la pli superan C2-nivelon – estas statistike nesignifa, proksimume 1%. La tiel nomataj ekspertoj de lingvolernado kiuj ne konas Esperanton, neniel povos plibonigi la situacion. Do, endas Multlingva Akcelilo!

D-ro Seán Ó Riain

La preskoboldo lasis siajn spurojn en la antaŭa numero, tiel ke aperis la sama Emiel-kontribuo kiel en numero 49. Ni pardonpetas. Pro tio, bonvolu trovi duoblan porcion da lingvo-frandaĵo, en jena numero.
La redakcio

MIYAMOTO MASAO (1913-1989). Japano; direkciano de akcia kompanio Esperanto. Esperantisto de 1934. Plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA. Eldonis multajn verkojn, interalie 'Nova vortaro E-Japana' en 1963.

EL LA URBA VIVO (dua parto).

Kun klak' alflugas
ĉielen pilko spure;
kun alkoholo
basbal' en televido
min savas per konsolo.

Incito zumas
de tram' prokrasta, kreskas
la fin' aŭtuna.

Vual' nebula
surfalas al rivero:
en krepuskiĝo
respiras l'urbo granda
momenton en libero.

En ĉi mateno
neĝadas furioze
por l'urbo rare;
malsano de l' patrino
nur kreskas serioze.

Lumfaskoj frapaj
kurkuras sur ŝoseo
al sud'; al nordo;
post buso kamiono
ĉe ĵipo tuj kupeo.

Uit het stadsleven (tweede deel)

Met een klap vliegt
een bal, een spoor trekkend naar de hemel;
met alkohol
baseball op televisie
redt mij 'als' troost.

Irritatie zoemt/gonst
over een verlate tram, groeit
het herfst-einde.

Een nevelachtige sluier
valt naar de rivier:
in de beginnende schemering
heradomt de grote stad
een ogenblik in vrijheid.

Op deze morgen
blijft het fel sneeuwen
voor de stad uitzonderlijk,
de ziekte van de moeder
wordt alleen maar erger.

Verblindende lichtbundels
snellen op de steenweg
naar 't zuiden, naar 't noorden,
na een bus, een vrachtwagen,
bij 'n jeep, onmiddellijk 'n coupé.

PRI LA POEMO

<u>La titolo.</u> El la urba vivo

Jen tre klara anonco. Tia, ke ĝi necese stimulas interesiĝon. La legonto estas jam preta, kompari kun personaj travivaĵoj° ! *ervaringen*

Versoj 1-2 Kun klak' alflugas
ĉielen pilko spure:

klako = bruo de io, kio klakas, ekz. klaki per la fingroj, per la lango, la pluvo sur vitroj…
Jen onomatopeo.
Kio **provokas** tiun klaksonon?
La energia ŝoto° sur la pilko! *schop, trap*
Kie supozindas, ke ia ludo estas ludata?
Pro° la titolo, verŝajne en iu parto de la urbo. *wegens*
Interkrampe: Kie troviĝas spuroj normale?
En la neĝo°, en la koto°/ŝlimo°. *sneeuw; modder*
Ĉu estas ia diferenco inter
a) 'alflugi ĉielen' kaj b) 'flugi al la ĉielo'?
La finaĵo '-en' estas uzata por montri la **celon** de movo. En a) ŝajnas esprimiĝi pli forte ia intenco, ia volo aŭ deziro de la subjekto de la verbo, ĉi-kaze la pilko. La afero estas prezentata tiel, ke oni emas° atribui° al tiu pilko ian intencon. *geneigd zijn* *toe te kennen*
Krome, la pilko estas kvazaŭ personigita kaj la leganto nevole° emas partopreni en ĝia° intenco. *onwillig* *van de/het*

Versoj 3-5. kun alkoholo
basebal' en televido
min savas per konsolo.

konsolo = parolo aŭ ago por mildigi° ies *milderen*

ĉagrenon°, doloron, bedaŭron° *verdriet; treurnis*
Kio fakte savas aŭ konsolas lin?
Eble ambaŭ°, alkoholo kaj televidi. *beide*
Pro kio li bezonus ian konsolon?
Eble pro la malapero° de la pilko? *verdwijnen*
Aŭ pro aliaj perdoj en lia vivo? Ni ne scias tion, ni nur povas diveni°. *raden*
(Notindas la stranga divido de la frazo pro... la rimo).

Versoj 6-8. Incito zumas
de tram' prokrasta, kreskas
la fin' aŭtuna.

inciti = iriti, aŭ pli grave° eksciti ies koleron. *erger nog*
zumi = aŭdigi kontinuan, malakutan° kaj obtuzan° bruon, ekz. la zumo de abeloj, analoge: homo zumas kanton. *dof* *gedempt*
(Jen denove onomatopeo.)
Kie estas la poeto nun?
Ie en la urbo, kie tramoj cirkulas kaj kie li staras atendante.
Kio estas tiu zumado?
Eble li aŭdas la murmuradon° de la atendantoj, kiuj koleras ĉar la tramo estas malfrua. Verŝajne li proprahaŭte sentis la malkomforton atendante mem. *gemor*
Rimarku kiel la uzitaj vortoj 'pro**kr**asta **kr**eskas' bone aŭdigas la krakan bruon de la tramo.
Kion la bruo de la vespera tramo sugestas?
Ĉu la pasadon de la tempo, la finon de la aŭtuno?

Versoj 9-10. Vual' nebula
surfalas al rivero:

vualo = ĉio, kio kaŝas la veron aŭ la realon
nebulo = amaso de densa akva vaporo aŭ io, kio, simile al nebulo, konfuzas la vidadon.
Kial tia vualo ne simple 'falas'?
La falado de la vualo okazas ne rekte sur la riveron sed en ĝia direkto.
Notindas ĉifoje la kvieta ritmado de tiu nekutima frazo.

Versoj 11-13. en krepuskiĝo
respiras l'urbo granda
momenton en libero.

krepusko: ochtend- of avondschemering
'respiras' = re-spiras, spiras denove.
'respiras momenton': dum momento.
'spiri' estas transitiva verbo, oni povas ekzemple spiri freŝan aeron.

Notu la kontraston inter 'granda' kaj 'momento', per kio akcentiĝas° kiom grandvalora° estas la libersento. *wordt benadrukt* *kostbaar*
Notindas ankaŭ: la speciala lokado de la adjektivo 'granda'. Ĉu por la ritmo de la verso?

Versoj 14-17. En ĉi mateno
neĝadas furioze
por l'urbo rare;

Jen alia sezono: la vintro, kio ne estas promesplena. Kial ne?
Neĝas abunde, kio ne estas kutima en la urbo, kie la poeto loĝas.

Versoj 18-19. malsano de l' patrino
nur kreskas serioze.

La etoso° estas efektive malbonaŭgura° ! *stemming* *onheilspellend*
La fortega neĝado ŝajnas ligita° al la plimalboniĝo° de la malsano de la patrino. *gelinkt; verergeren*
La rimado forte akcentas la ligon° inter la vintro kaj la zorgiga° sanstato° de la patrino. *link* *zorgwekkend* *gezondheidstoestand*
Kiel oni komprenu tiun strangan vorteton '**nur**'?
Verŝajne subkomprenite senŝanĝan° malboniĝon°? *onveranderlijk* *verslechtering*

Versoj 19-23. Lumfaskoj frapaj
kurkuras sur ŝoseo
al sud'; al nordo;
post buso kamiono
ĉe ĵipo tuj kupeo.

lumfaskoj (kp.france 'faisceau de lumière')
frapaj = ĉi tie figura signifo, kp. 'okulfrapa'
Estas bone konate, ke tiaj lumfaskoj povas esti ne nur frapaj sed vere **blindigaj**°. *verblindend*
kurkuras = ne en la vortaro; supozeble la poeto volas per la ripetado akcenti la rapidon?
kupeo: *coupé, compartiment* - ĉi-tie verŝajne kontraste al la ĵipo (kovrita aŭto).
Kio speciale notindas en la priskribo de tiu moderna, trafikplena ŝoseo?
En tiu ĉi verso notindas la bela varieco de la vortoj, kaj la ritmo, kiu tre bone respegulas la densan trafikon en la urbo.

Ĝenerala impreso
Jen ege originala poemo pri fakte ne tre inspirpova temo !
'El la urba vivo', el kiu ni elektis la duan parton, similas iom al kolekto de mallongaj poemoj, mozaiko, libera sinsekvo° de impresoj, de unu tago al alia, de unu sezono al alia. *opeenvolging*

La tre regula **ritmo** rimarkindas. Ĝi ŝajnas inspirita de la hajko kaj tankao, tipa japana poezio. Hajko skribita en tri linioj, kies unua kaj tria linio havas 5 silabojn kaj la dua 7; en la tankao du linioj de sep silaboj estas aldonitaj.

Hajko plej ofte komenciĝas per ia sentumiĝo°, ofte sensaĵo en *zintuiglijke waarneming* la naturo kaj la etoso kiun ĝi sugestas. Tio ankaŭ ĉe Masao okazas ĉi tie.

Hajko, kun siaj tri versoj povas esti ege **konciza**°. Ĝi unuavide° *beknopt; op het eerste gezicht* aspektas ege simpla, kun simplaj vortoj. Tamen ili povas efekti suprize, pro kio ili sugestas pli profundan signifon. Ĉi tie ekzemple, en la unua parto, kie estas sugestita ĉagreno aŭ en la tria, kie subite temas pri libero° kaj en *vrijheid* la kvara, kie temas pri la malsano de la patrino.

En hajko **la rimo** ne gravas. Masao kelkfoje rimas: alkoholo/konsolo (unua strofo), rivero/libero (tria strofo), furioze/serioze (kvara strofo) kaj ŝoseo/kupeo (lasta strofo). Ĉu eble saluto al la tradicia europa poezio?

PLIE PRI KELKAJ UZITAJ VORTOJ

Ni lasas nin inspiri de Zamenhof.

Alflugi (Verso 1)

1) **Elmetu mielon, muŝoj alflugos.**
Lett.: Plaats honing in 't vrije, vliegen zullen komen aanvliegen.

Kie estas mielo, tie muŝoj... ne mankas.

Alivorte ?

Bone pripensu kiam vi montras publike ion, kio... povas esti **tenta**°. Evitu provoki... *verleidelijk* tentadon.

2) **Flugema kiel vento.**
Lett.: Vluchtig als de wind.

flugema = volonte fluganta

Dirinda kiam?

Kiam temas pri iu, kiu ne emas longe resti surloke.

3) **La timo havigis al li flugilojn.**
Lett.: De angst deed hem vleugels hebben.

Alivorte?

Li fuĝis°. *vluchten*

Notu: Verbo kun komplementoj; **havigi ion al iu.**

Kiam male° dirindas pri iu, *integendeel*
ke liaj flugiloj paraliziĝis°? *verlammen*

Kiam li ne plu aŭdacas aŭ ne plu emas° *geneigd is* agi aŭ reagi *tiom* vive aŭ libere kiom° *zozeer als* antaŭe.

Kiam tiaĵo° eblas? *zo iets*

Pro surprizo, pro timo°. *vrees*

Flugiloj estas aliflanke ofte citataj por komparo al ies... **konduto**°. Tiu povas esti *gedrag* efektive° aŭ paralizigita aŭ *inderdaad* ekspansiva°. *uitzettend*

Ĉielo (verso 2)

1) **Aliloka ĉielo estas sama ĉielo.**
Lett.: De hemel op een andere plaats is dezelfde hemel.

Ĉu vere? Kiam estus imagebla okazo por diri **tiaĵon**°? *zo iets*

Ne tiom rare okazas, ke oni ne tute kontentiĝas pri sia persona situacio kaj pensas aŭ revas pri io pli bona. Ĉi tie tamen oni provas° konvinki iun, ke tre verŝajne la *proberen* situacio aliloke... ne necese estas pli bona.

2) **En nomo de l'ĉielo, sed pro bono de... l' felo.**
Lett.: In naam van de hemel, maar om het welzijn van het vel.

Jen bela rimo, sed dirinda kiam?

Subkomprenendas: fari ion laŭdire en la nomo de la moralo, de sia konscienco, de iu religio sed... por sia propra bono.

Alivorte?

Agi laŭdire pro ia supera ordono, sed *bevel* fakte por la propra profito/utilo.

3) **Kiu rigardas ĉielon, maltrafas... sian celon.**
Lett.: Wie naar de hemel kijkt, mist zijn doel.

(Notindas denove bela rimo!)

Dirinda kiam?

Unu klarigo estus, ke maltrafas sian celon iu, kiu... ne sufiĉe atentas. Alia estus, ke se iu deziras atingi ion, kio estas super sia forto, kapablo li certe ... ne sukcesos.

4) **Pura ĉielo fulmon° ...ne timas.**
Lett.: Een heldere hemel vreest de bliksem niet.

Komprenebla, ĉar fulmo eblas nur en kia ĉielo?

Ĉe **nuba**° ĉielo. *bewolkt*

Komparinda situacio ĉe homo: Iu, kiu havas aŭ faras nenion riproĉeblan°, timu ... *te verwijten* nenion!

5) **Ne gutas mielo el la ĉielo.**
Lett.: Er druppelt geen honing uit de hemel.

Kompreninde: Bonaĵoj ne simple falas sur nin, oni faru... la necesan streĉadon°. *inspanning*

Savi (verso 5)

1) **Kiu neniun savis, malamikojn ne havas.**
Lett.: Wie niemand gered heeft, heeft geen vijanden.
Wie niets doet, niets misdoet.

Kia stranga esprimo!

2) **Longa konsidero savas de sufero.**
Lange overweging waarborgt tegen leed.

Pli bone ne esti

impulsiĝema°. *geneigd om impulsief te worden*

3) **Dronanto domon proponas, savito... eĉ brikon ne donas.**

Lett.: Een drenkeling biedt een huis, een geredde geeft nog geen baksteen.

Pri kiom da homoj temas en ĉi rakonto de Z.?
Pri la sama homo, en du aliaj situacioj.

Kion konkludi?

a) Ne tro facile kredi la promesojn de iu, kiu vivas en malfacilaj kondiĉoj kaj ion tentan° proponas. *verlokkelijk*

b) Certe estas normale, helpi iun en tia kondiĉo sed estas prudente, saĝe,... ne tro fidi° eventualajn promesojn. *vertrouwen*

Konsolo (verso 5)

1) **Kiu multe parolas, malamikon konsolas.**

Lett.: Wie veel praat, geeft een vijand soelaas.

Ĉu ne jen malfacile komprenebla aserto°? *bewering*
Ĉu Zamenhof volas diri, ke konsoli ne postulas multajn vortojn?

2) **Restas nek konsilo,nek konsolo.**

Lett.:Er resteert noch raad, noch troost.

Jen ĉi-foje ege pesimisma esprimo !
Kiam dirindas tiu tamen tre bele sonanta konstato?
Kaze de terura, senespera° situacio.
hopeloos

3) **Mi konsoliĝas per tio, ke mi tuj estas venĝita.**

Lett.: Ik word getroost daardoor, dat ik onmiddellijk gewroken ben.

Jen kontestebla° ideo. Ĉu la venĝo *betwistbaar* estas iam konsilinda°? Sed ĉu venĝo *aan te raden* estas vere konsolo?

Inciti (verso 6)

1) **Abelujon ne incitu, amason ne spitu.**

Lett.: Irriteer geen bijenkorven, daag geen menigte uit.

Jen ege komprenebla konsilo ĉar...
la reagoj estus tre fortaj.

2) **Urson evitu, duonpatrinon ne incitu.**

Lett.: Vermijd de beer, maak de stiefmoeder niet boos.

duonpatrino = dua edzino de patro rilate al liaj infanoj de la unua edzino
Duonpatrinoj havas malbonan famon. Zamenhof ĉerpis el la proverboj uzitaj de lia patro en "Frazeologio...", kiu spegulis la antaŭjuĝojn de la socio en Varsovio komence de la 20a jarcento.

3) **Malbone kaŝita ŝteliston incitas.**

Lett.: Wat slecht verstopt is, spoort de dief aan.

Jen bona antaŭrimedo°, sed *voorzorgsmaatregel* certe nesufiĉa!

Doni (verso 6)

1) **Se vi donas mielon, donu ankaŭ kuleron.**

Lett.: als je honing geeft, geef dan ook een lepel.

Alivorte?
Faronte ian donon oni ne forgesu certigi, ĉu la donaĵo povos esti uzata.

2) **Doni ovon, por ricevi bovon.**

Lett.: Een ei geven, om een rund te krijgen.
Een bliekje werpen om een snoek te vangen.

TRADUKEKZERCOJ

Antaŭa.

1) Rapide iras la vortoj, sed ne rapide la agoj.
2) Ĉiam pli da vortoj son(ad)as, sed ĉiam malpli per ili estas dirita.
3) Ripeti/rakonti ion vorto post vorto.
4) Li ne eksplicis tion, sed tamen klare kompreneble parolis.
5) Ĉe li oni devas tiri la vortojn el l(i)a gorĝo = li neniam diras spontane ion ajn.
6) Vortoj estas ventoj; skribaĵoj ligas.
7) Kelkfoje pli laŭtas la sento, ol la prudento.

Nova.

1) Onze natuur vraagt beweging; de volledige rust is de dood (Pascal).
2) Men verveelt zich bijna altijd met de personen bij wie men zich niet mag vervelen.
3) Allen geloven en niemand gelooft: het een en het ander is fout (Seneca).
4) Waar veel licht is, is veel schaduw.
5) Wie in welstand leeft, heeft de zorg die te behouden/ wordt benijd.
6) Geen honing zonder werk. Geen loon of beloning zonder dat er moeite voor gedaan is.

E. Van Damme

Eble mi estas ĝenata pro la vintro, kiu daŭras tro longe, ĉar mi denove prezentas kelkajn versojn elektitajn el la poemo 'Provencaj Ferinotoj' de Henri VATRÉ (1908-1998), aperinta en "Esperanto Antologio. Poemoj 1887-1981".

La trunkokriplaj	De met verminkte stam
miljaraj olivarboj	duizendjarige olijfbomen
abunde fruktas.	dragen overvloedig fruit.
Ĉe mi nur pajlodone	Bij mij, alleen om stro te geven
draŝiĝas magraj garboj.	worden gedorst magere garven (bundels).
Ni alten grimpas	We klimmen hoog
pocole kaj sen hasto	duim per duim en zonder haast
sur roko kruta.	op een steile rots.
Ĝis fore sin etendas	Tot ver strekt zich uit
turistimuna vasto.	een ruimte immuun voor toeristen.
Odoroj varmaj	Warme geuren
el fumo, kafo, vino	van rook, koffie, wijn
kaj pano blonda,	en blond brood,
kun la pupiloj ardaj	met de vurige ogen
de tiu junedzino.	van die jonge echtgenote.
Prizone muras	Als een gevangenis ommuurt
nun preme la ĉielo.	nu drukkend de hemel.
Ho, kun vi fuĝi	Ho, met jou vluchten
sub la meridianoj	onder de meridianen
de bunta pluvombrelo !	van een bont regenscherm !
Gregemaj steloj	Samenbundelende sterren
pilgrimas laktavoje	pelgrimeren op de melkweg
al kiuj celoj?	naar welke doeleinden ?

PRI LA POEMO

Versoj 1-3 La trunkokriplaj
miljaraj olivarboj
abunde fruktas.

trunkokriplaj= kun kriplaj trunkoj, alivorte: ili ne plu havas rektajn nek harmonie kurbajn trunkojn.

Pro kio tiuj olivarboj havus tiajn kriplajn trunkojn?
Certe pro sia aĝo ili travivis multe da veter-agresoj.

miljaraj

Ĉu olivarboj povas iĝi ĝis pli ol mil-jaraj?
Iuj olivarboj estas tiom grandaj, ke oni konsideras ilin pli aĝaj ol miljaraj. La aĝo de arbo estas kalkulata laŭ ĝiaj jar-ringoj. Tiel sciencistoj en 2012 kalkulis ke la plej aĝa olivarbo en Hispanio estas 627-jara. Estus mirinde°, ke arboj tiom aĝaj povus ankoraŭ frukti. *verwonderlijk*

abunde

= donas fruktojn pli ol necesas.
El kiu franca vorto? '*abondance*'

Versoj 4-5. Ĉe mi nur pajlodone
draŝiĝas magraj garboj.

pajlo

= aro° da sekigitaj° tigoj° *verzameling; gedroogde; twijg*
kaj folioj° de kultivplantoj (PIV) *blad*

draŝi

= treti aŭ bati rikoltitan° grenon°, *geoogst; graan*
por malfiksi kaj apartigi la grajnojn (PIV).

garbo

= fasko° de falĉita° greno aŭ *bundel; gemaaid*
trancitaj° vegetaĵoj° (PIV). *afgesneden; plant*
Ĉe la aŭtoro oni draŝas magrajn garbojn.

Kia klimato estas do ĉe li hejme?
Malvarma klimato, li estas sviso.

Versoj 6-8 Ni alten grimpas
pocole kaj sen hasto
sur roko kruta.

Kial 'alte**n**' kaj ne 'alte'?
La -n indikas movon° kun celo°, *beweging; doel*
do akuzativa formo.

pocole
= en ritmo de ± 3cm ĉiufoje.

kruta
= kun forta deklivo°. supren aŭ ne. *helling*

Kia estas tiu grimpado entute?
Ege malrapida, malfacila, eble danĝera kaj eĉ riska !

Versoj 9-10 Ĝis fore sin etendas
turistimuna vasto.

Kial tiu vasto estus imuna por turistoj?
Probable ĉar la loko estas tiom malfacile atingebla, ke vizitantoj estas raraj.
Ĉiaokaze tio ne ŝajnas ĝeni la aŭtoron!

Versoj 11-15 Odoroj varmaj
el fumo, kafo, vino
kaj pano blonda,
kun la pupiloj ardaj
de tiu junedzino

Jen ege surpriza kontrasto kun la antaŭaj versoj! Kio okazis?
Klare ni forlasis la antaŭan ĉirkaŭaĵon !
De la naturo la atento nun iras al la aferoj kiujn la homo faras kaj kiuj agrabligas la vivon.
Kien ni alvenis° nun? *aankomen*
Ien, kie aperas junedzino kaj la atento klare... koncentriĝas al tiu preciza persono ! *van iedereen*
Kio speciale ĉe ŝi altiras ĉies rigardon?
Ŝiaj ardaj pupiloj !

blonda=?
= helflava aĵo, ekz. blonda biero, blondaj haroj, blondaj kornspikoj°. *korenaar*
Kroma rimarko pri tiuj versoj:
Notindas la aparta **sono-harmonio** de la vortoj !

Versoj 16-20 Prizone muras
nun preme la ĉielo.
Ho, kun vi fuĝi
sub la meridianoj
de bunta pluvombrelo !

Jen nekutima omaĝo al pluvombrelo !
Post pripenso, tamen, tute komprenebla.

fuĝi =?
forkuri por...
savi sin de reala aŭ imagata danĝeron (PIV).
Oni rekonas la radikon 'fuĝ' de la franca 'fugitif'.
Ĉu vi akceptus la **fuĝintojn** en via domo?

Versoj 21-23 Gregemaj steloj
pilgrimas laktavoje
al kiuj celoj?

gregemaj
= tiuj, kiuj emas° *geneigd zijn*
kolektiĝi° en grego°. *bijeen te komen; kudde*
Komparinde: oni povas esti laborema, kolerema, babilema, manĝema ktp°. *kaj tiel plu*
Ĉu tiaj gregemaj steloj vere ekzistas en la realo?
Eble pro ia altira forto° *aantrekkingskracht*
de la masoj?
Eble jen la imago° de la poeto? *verbeelding*
Oni prefere komprenu, ke al ni ili povas aspekti en gregoj. Homoj emas atribui° *toekennen*
tiajn kvalitojn al aĵoj° por ilin... *dingen*
kvazaŭ° personigi. *als 't ware*

pilgrimi = vojaĝi
a) kun religia celo al loko konsiderata kiel sankta
b) por respektoplene° viziti *vol respect*
arkitekturajn ĉefverkojn°. *meesterwerken*
Bona islamano devas unufoje en sia vivo pilgrimi al Mekko.
Kial tia verbo? Ĉu tio direblas/dirindas ankaŭ pri steloj?
Jen poezia interpretado°! *voorstelling*
Kial la poeto elektis tian verbon?
Verŝajne la beleco kaj la grandeco de la spektaklo emocias° lin tiom, ke li *ontroert*
deziras esprimi tion per specialaj vortoj. Ĉi tie la imago de la poeto flugas libere kaj fantaziplene, sed la ideo estas certe bele alloga. *aantrekkelijk*

al kiuj celoj?
Ĉu iu iam scios tiun tuton?
Ĉu ne jen iom stulta demando?
Certe ne. Ĝi formas la lastan strofon de la poemo. Rigardi la stelojn ŝajnas plie okupi la poeton kaj ili sugestas ĉe la poeto ekzistencialistan demandon pri la celo de la movado de la steloj en la lakta vojo, eĉ de la galaksio, ni aŭdas la eĥon de demando, kiun

pensanta homo iam en sia vivo devas starigi pri la celo de sia vivo.

Ĝenerala impreso pri la poemo
Relegante la poemon post la supra analizo de kelkaj strofoj, oni pli bone konscias kiom la poeto povas sugesti pere de simplaj vortoj kaj simplaj versoj.
Krom tio, la regula reapero de eta rimo en ĉiu strofo sufiĉas por doni al la tuto duoblan ĉarmon.

PLIE PRI IUJ UZITAJ VORTOJ
Kruta (verso 8)
= preskaŭ vertikala.
Ŝtuparo° tro kruta aŭ kruta **vojo** *trap*
malkonsilindas por kiaj personoj?
por maljunuloj, por kripluloj°. *gebrekkigen*
Ili malfacile moviĝas egale supren aŭ malsupren.
En kiu eŭropa lando ekzemple, kelkaj vojoj estas vere **krutaĵoj**?
en Svislando.
Kiajn pneŭ (matik)ojn oni prefere uzu sur tiaj krutaj vojoj?
antiglitpneŭojn

Esti imuna de/kontraŭ io (verso 10)
Por ke ni ne tro facile malsaniĝu, nia organismo devas esti rezista/imuna kontraŭ certaj mikroboj.
Kio estas ekzemple la utilo de gripvakcino**?**
Ĝi utilas por **imunigi**°... *immuniseren, beschermen*
kontraŭ la gripo.
En figura senco: esti imuna de kritiko.
Interkrampe kaj iom humure: ĉu iu povas esti imuna de ĉia eraro, alivorte: erarimuna? Ĉu ekzistas ia vakcino kiu imunigas kontraŭ eraro?
Ĉu ekzistas **ligno**° imuna kontraŭ fajro? *hout*
Kiel **fari ion akvimuna**° aŭ **pluvimuna**? *waterdicht*
=surfacon nepenetreblan per akvo?
Analoge: **brulimuna**°, **rustimuna**°. *brandvrij; roestvrij*

Grego (verso 21)
Plej ofte rilatas al kio?
al bestoj kiel ekz. bovoj, bovinoj, ŝafoj, elefantoj kaj aliaj.
Kiuj bestoj estas plej gregemaj?
Malfacila demando !
Kial la pasantoj **emas**° **kungregiĝi** ĉe ia akcidento? *geneigd zijn*
pro **scivolemo**° aŭ **helpemo**. *nieuwsgierigheid*
Ĉu ia **gregemo** ĉe homo estus io surpriza°? *verrassend*
Certe ne, ĉar homoj ĝenerale malamas° *haten*
solecon° kaj izolitecon°. *eenzaamheid; afzondering*
Gregano° kaj grega spirito° *kuddemens; kuddegeest*
havas pli pejorativan sencon.

Stelo (verso 21)
Por ni la vorto 'stelo' ne ĉiam sugestas tion, kion ni vidas en la ĉielo dum klara nokto. Ekzemple?
a) En astrologio la vorto temas pri astro, rigardata kiel influanta la sorton de homo.
Pro tio: Esti naskita sub… favora stelo.
Io estas skribita… en la steloj.
b) Kelkfoje ni ankaŭ referencas per tio al homoj: stelo estas iu, kiu staras en la centro de la interesiĝo (ekz. li estas la stelo de la vespero), aŭ iu, kiu estas fama (ekz. kinostelo).
c) Aŭ ni pensas pri la formo, ekz. io kvinpunkta-stela aŭ ankaŭ, kaj ege grave, la verda stelo de la esperantistoj.

KELKAJ LERNINDAJ ZAMENHOFAĴOJ
Pri frukto (verso 3)
1) **Frukto malpermesita estas… plej bongusta.**
Laŭvorte: Verboden vrucht is uiterst smakelijk.
Verboden vruchten smaken het lekkerst.
Tion povas nur scii iu, kiu ĝin gustumis.
2) **De semo putra venas… frukto ne nutra.**
Laŭv.: Van rot zaad komt een niet voedzame vrucht.
Kiam la subaj estas speciale dirataj **pri homoj**?
3) **Laŭ la frukto oni… arbon ekkonas.**
Aan de vrucht herkent men de boom.
Laŭ la infanoj oni trovas trajtojn de la gepatroj.
4) **Ne falas frukto… malproksime de l' arbo.**
De appel valt niet ver van de boom.
Ĉu ankaŭ vi, kara leganto, rekonas ĉe vi mem ecojn° aŭ kondutojn de viaj gepatroj? *eigenschappen*
5) **Lernado sen frukto ne… restas.**
Laŭv.: Het leren blijft niet zonder vrucht.
Alivorte
Kiu lernas, profitas. Do bona instigo° *aansporing*
por okupiĝi pri Esperanto.
6) **Scienco havas semon enuan, sed… frukton bonĝuan.**
Laŭv.: Wetenschap heeft vervelend zaad, maar een smakelijke vrucht.
La unuaj kontaktoj kun ia scienco ne ĉiam estas agrablaj, sed ili tamen donas rezultojn.
Alivorte? La ĝuado° ne necese estas *genot*

tuja°, sed ĝi povas veni poste. *onmiddellijk*

Pri pano (verso 13)

1) **Akvo kaj pano servas... al sano.**
Laŭv.: Water en brood dienen de gezondheid.
Jen rimiĝanta konsilo° por eviti malsanon ! *raad*
Kiam tio speciale dirindas°? *is waard te zeggen*
Fakte jen amuza pledado° por *pleidooi*
sobreco°. *, soberheid.*

2) **De tro da pano... venas malsano.**
Laŭv.: Van te veel brood komt ziekte.
Ĉu vere?
Certe ĉia troigado° kondukas al *overdrijving*
problemoj.

3) **Instruas mizero manĝi panon.. sen butero.**
Laŭv.: De miserie leert brood zonder boter te eten.
Mizero devigas° iun *verplicht iemand*
disvolvi° iajn° kvalitojn! *ontwikkelen; zekere soorten*
Komparu: El la mizero fari virton.
Van de nood een deugd maken

4) **Kie estas pano, ne mankas... panpecetoj.**
Laŭv.: Waar er brood is, ontbreken de kruimels niet.
Kaj alivorte?
Kiu havas ion povas certe ian parteton doni.

5) **Kie pano estas,… tie musoj ne mankas.**
Laŭv.: Waar er brood is, ontbreken de muizen niet.
Dirinda en kia situacio?
Ĉia interesa aĵo povas altiri aliulan° *andermans*
atenton.

6) **Kiu serĉas marcipanon,… perdas sian panon.**
Laŭv.: Wie marsepein zoekt, verliest zijn brood.
Ni pli bone kontentiĝu pri tio, kion ni havas.
